## NOMOJ DE AFRIKAJ LINGVOJ KAJ IDIOMOJ

**tradukitaj de dipl. inĝ. C. Naoumoff**

laŭ eltiraĵo el **Classification Décimale Universelle**
Volume I á III, Publication de l' I. I. B. № 151
Institut International de Bibliographie
Palais Mondial — Bruxelles, 1927—1929.

| UDK-indico | franca nomo | esperanta nomo |
|---|---|---|
| =960/965 | Langues de l'Afrique | Afrikaj lingvoj |
| | Langues Noirs, des Négres | |
| =960 (73) | Dialectes négres aux Etats-Unis (africo-américain) | Dialektoj negraj en Usono (afriko--amerikana) |
| =961 | Langue des Hottentots | Lingvo de la Hotentotoj |
| =961.1 | Dialecte Nama | Nama-a dialekto |
| .2 | Dialecte Kora | Kora-a dialekto |
| .3 | Hottentot du Cap | Hotentota lingvo de Kablando |
| =962 | Langue des Boschimans | Lingvo de la Boŝman-oj |
| =963 | Langues du groupe Bantou. Langues dites des Cafres | Lingvoj de la grupo Bantu-o. Lingvoi de la Kafr-oj |
| =963.1 | Branche de l'Est | Branĉo de la Oriento |
| =963.2 | Branche du Centre | Branĉo de l'Centro |
| =963.3 | Branche de l'Ouest | Branĉo de la Okcidento |
| =964 | Idiomes divers parlés par les négres | Diversaj idiomoj parolataj de la negroj |
| | On a établi une simple enumération de groupes qui ne constitue en rien les ramifications d'une même souche linguistque. Le sous-classement est centésimal | Oni nur starigis elnomantan liston da grupoj kiuj tute ne montras la disbranĉiĝojn de iu ajn komuna lingva deveno. La subklasifiko estas centona. |
| =964.11 | Wolof | Volof-o |
| .12 | Groupe Mandé | Grupo Mande-a |
| .13 | Groupe Féloup | Grupo Felup-a |
| .14 | Sourai | Surai-o |
| .15 | Haousa | Haŭza-o |
| .16 | Groupe Bournou | Grupo Burnu-a |
| .17 | Groupe Krou | Grupo Kru-a |
| .18 | Groupe Egbé ou Evé | Grupo Egbea aŭ Eve-a |
| .19 | Ibo | Ibo-o |
| .21 | Mitchi | Miĉi-o |
| .22 | Groupe Mosgou. Noupé | Grupo Mosgu-o. Nupe-o |
| .23 | Baghirmi | Baghirmi-o |
| .24 | Maba | Maba-o |
| .25 | Groupe des langues parlées par les négres du Haut-Nil. (Chilouk, Dinka, Nouer, Beri) | Grupo de la lingvoj parolataj de la negroj de la alta-Nilo (Silukoj, Dinkoj, Nueroj, Berioj) |
| =965.1 | Langues nubiennes | Nubiaj lingvoj |
| .2 | Langue des Pouls. Foulbé | Fulbe-o |



SCIENCA REVUO, eldono de Internacia Scienca Asocio Esperantista, Vol. 15, n-ro 1/2 (1965)

7.01 (520)

## ESENCO DE LA JAPANA ARTO

(prelego en Internacia Somera Universitato, Harrogate, 1961.)
**Prof. Dro Hideo Yagi, Japanujo**

### Antaŭparolo

Estimataj Gesamideanoj,

La temo de mia parolado estas »Esenco de la Japana Arto« Ĝi estas iom malfacila temo, ĉar oni povus tuŝi diversajn flankojn de la sfero, kiuj estus malsamaj laŭ vidpunkto de la aŭtoroj. Tie ĉi mi volas [illegible] akizi mian propran opinion rilate al tiu interesa, sed malfacila temo. Dum la parolado mi volas montri al vi koloritajn lumbildojn por ke vi povu kompreni min pli bone, vidante aktualajn objektojn.

Mi pensas, ke en la Japana arto troviĝas du elementoj, unu estas supozeble propra japana kaj la alia eble importita el la kontinento, rekte el la Ĉina lando. La antaŭa havas tipon de karakterizaĵo »simpla aŭ modesta aŭ malluksa«, kaj la alia, kontraŭe, »pompa kaj luksa«. La unua estas sindetenema kaj kompreneble tute rafinita. Ĝi estas influita de Budaismo kaj precipe de »Zen« sekto kaj ĝi enhavas nuancon de [illegible] kaj rezigno. La dua estas malpli rafinita, sin amuziga, infanema aŭ vivanta. Tiujn ĉi du elementojn oni povas vidi en diversaj flankoj, k. e. domo, palaco, ĝardeno, pentraĵo ktp. Tamen, mi diras, ke la unua tipo de simpleco estas esence propra japana arto, kreita en la longa historio de Japanujo, estas nome la ĉefa japana arto. La alia estas [illegible] tipo, kiu tamen ofte rompas monotonion, donanta ŝanĝon aŭ variadon.

### Konstruaĵo

**1) Kastelo**

Kastelo estis loĝejo de feŭda sinjoro en la Mezepoko en Japanujo. Ĝi estis konstruita sur monteto kaj donis imponan elrigardon. Sed, la muro estis ĉiam blanka kaj nur tiu ĉi blanka koloro regis la tutan

lokon. La formo estis ĝenerale kelketaĝa kun koridoroj. Ornamo estis tre simpla ekstere. Ĉe la interno ornamo estis ankaŭ simpla kaj neluksa, kompare kun palacoj en okcidentaj landoj.

**2) Palaco, Templo, Ŝinto-templo, Vilao kaj Domoj**

En okcidentaj landoj palacoj estas preskaŭ ĉiam belaj, luksaj kaj imponaj. Ili penis imponi per diferencigo de la populara, publika nivelo. Sed, en Japanujo, palacoj ŝajnas preferi sin meti sur la populara nivelo kaj ne volis sin diferencigi de la alia. Eĉ la malnova Imperiestra Palaco en Kioto ŝajnis tute ne luksa, preskaŭ sama je vilao aŭ domego de ordinara riĉa persono. La konstruaĵo mem estas tute sama kun alia ĝenerala domo. Templo, Ŝinto-templo, vilao, vilaĝaj domoj-ĉiuj posedas karakterizan simplecon. Japano volis trovi belon en tiu ĉi simpleco. Ligno estas ĉefe materialo por konstruo. Ligno estas rabotita kaj ĉe la surfaco lignovejnoj sin montras. Tiun ŝatas la japano kaj ne kolorigas lignon.

Estis **Bruno Taut**, germana arkitekto, kiu trovis mirindan belon kaj harmonion de Kacura Vilao, Kioto, en simpla, modesta kaj eleganta formo. Kaj li diris, ke la arto estas sento, sed ne formo«.

Kiel escepto, oni vidas Nikko, Niŝi-honganĵi, k. a., kiuj estas pompe ornamitaj. La nuna Imperiestra Palaco estas eŭropstila. Ĉiuokaze, luksa eksteraĵo aŭ pompa allogema vido estas ĉinstila kaj la japanpropra tipo restas ĉiam en maksimuma simpleco.

### Ĝardeno

Japano havas individuan ĝardenon, ĉu grandan aŭ malgrandan, ĉe sia privata domo. Granda ĝardeno troviĝas ĝenerale en palaco, templo, ŝinto-templo kaj aliaj grandaj domoj. Malgranda ĝardeno troviĝas ĉe privata loĝejo, sed ĝi estas kutime imitita malgrandigo de la antaŭa. Publika parko en sia propra senco estis farita fakte en modernaj jaroj. Tio estas importaĵo de la okcidenta modelo.

Parolante pri propra japana ĝardeno, oni distingas du tipojn: unu, ebena ĝardeno kaj la alia **monteta ĝardeno**. Mi parolos unue pri la ebena ĝardeno.

En la Rjoanĵi ĝardeno (Kioto), kiu estas unu el la plej famaj ĝardenoj en Japanujo, Vi nur vidas kelkajn rokojn de diversa grandeco sur blanka sablo. Eŭropanoj kaj Usonanoj, kiuj vizitas tiun ĉi ĝardenon, vidas komence simplan neinteresan ĝardenon. Sed, se ili restas kelkajn minutojn ili komencas kompreni la ideon kiun ĝi enhavas. Se ili restas unu horon, rigardante trankvile la tutan scenon, ili fariĝas forte impresitaj, ekadmiras la belecon kaj volas eĉ koncepti grandiozan inspiron aŭ eĉ filozofion de la vivo. Sro Sô-ami, la kreinto, volis prezenti per



la sceno tigron kun tigridoj, kiuj forkuras de unu insulo al alia pro persekuto de leopardo. Ĉu vi komprenas tian signifon? Germana kolego, kiun mi akompanis tien, diris post unuhora rigardado, ke la ĝardeno montras senlime grandan oceanon kun landoj aŭ la kosmon kun terglobo, donante al li senlime grandan mondon kaj tre malgrandan valoron de la vivo. Tiel malsamas la ideoj, kiujn oni akiras vidante la ĝardenon. La tekniko estas tre smpla kaj pro simpleco la signifo aŭ la ideo, entenata de la ĝardeno, fariĝas pli kaj pli komplikita. Ĝi estas kovrita per blanka sablaro kaj sur ĝi estas 15 rokoj. Ebena, plata kaj nenio plu.

La dua tipo de japana ĝardeno estas »monteto-ĝardeno«, kiu estas pli populara ol la alia. En multaj lokoj, eĉ en malgrandaj privataj dometoj, oni havas tiun ĉi ĝardenon, unuvorte ĝi estas tre multe disvastiĝanta tra la lando. En tekniko de formado de tiu ĉi ĝardeno ekzistas kelke da skoloj tradicie heredantaj. Inter alie »Enŝu-skolo« estas fama. »Korakuen« en Okayama estas unu el la tri famaj parkoj de Japanujo. Oni fosis lageton kaj artefaris monteton apud la lago per la tero fosita, lasis kovri monteton per razeno, plantis arbojn de diversa grandeco kaj fine faris ponton sur la lageto. Al kaj de la lageto fluas rivereto, fariĝas kaskado survoje k. a. jen formiĝas bela ĝardeno. La signifo estas »formi naturan scenon en malgranda spaco« aŭ alivorte »havi miniaturan naturon ĉe si proksime«. En la ĝardeno troviĝas kelkaj tedomoj.

Tiu speco de ĝardeno estas videbla ĉie tra Japanujo.

### Te-ceremonio

Ideo de teceremonio estas pure japana. Ekzistas kelkaj skoloj de la tekniko, sed la principo estas la sama. Oni volas koncentrigi senton, sentimenton aŭ simple la koron dum oni preparas kaj trinkas teon. Se mi rakontas unu modelon de la ceremonio, kelke da personoj, alproksimiĝas al tedomo, malgranda simpla dometo kun unu aŭ du ĉambroj. La ĉefa ĉambro havas kvar kaj duono da matoj. En ĝi troviĝas forno, sur kiu en fera poto bolas akvo. Personoj aŭ gastoj devas lavi siajn manojn ekstere de la domo, per pura akvo, eniras en la ĉambron kaj unue rigardas alkovon, kie rulpendaĵo estas montrita, sur kiu pentraĵo aŭ literoj estas desegnitaj. Oni rigardas, kritikas kaj laŭdas ĝin. Nu oni sidiĝas unu apud alia ĉe fiksita sidloko. Te-preparanto preparas trankvile, serioze, teon per bolanta akvo. Tiu procedo estas severe ceremonia. Aliaj sidas kaj vidas la manieron, kiel teo estas farata. Do laŭ indiko de la preparanto ili komencas manĝi kukon dolĉan, kaj trinkas teon unu post la alia. Post la trinkado oni devas rigardi la tetason kaj laŭdi ĝin, pli bone diri la fabrikinton kaj tempon de fabrikado. Tiu ĉi estas ĉio laŭregule farata. En la ĉambro regas trankvila

atmosfero. Neniu bruo, krom ronko de bolanta akvo. Severa silento. Medito kaj introspekto.

Procedo aŭ ekstera formalaĵo estas nun jam monde fama, sed la principo estas grava je la ideo aŭ koro kiel trinki teon en koncentrigita sento. Trinkante teon oni penas koncentrigi maltrankvilan konstaton. Simpla estas eksteraĵo, sed grava estas la ideo-tiun principon la japano plej ŝatas.

### Floraranĝo

Floraranĝo estas unu el la propraj japanaj artoj, kiu disvastiĝas tra la tuta lando kaj estas farata de ĉiu klaso de la popolo. Bele aranĝita floro en vazo ornamas kutime alkovon de gastĉambro aŭ vestiblo de ĉiu domo. Oni diras, ke la origino de tiu ĉi arto komenciĝis en 1483, kiam Ŝoguno Aŝikaga Yoŝimicu konstruigis Arĝentan Pavilonon en Kioto kaj lasis ornami tedomon en ĝi per floroj. De tiam evoluis la arto al 300 diversaj skoloj, kiuj ĉiuj havas eĉ hodiaŭ multe da lernantoj. Ĉefaj skploj estas tamen du, la **formala** kaj la **natura.** En la formala skolo, oni instruas aranĝi laŭ principo »ĉielo-tero-homo«, kiel ekzemple, elekti florherbon aŭ arbeton kun du subaj apudbranĉoj, lasas la pinton (ĉielo) meze, branĉeton sur la dekstra flanko kurbigitan en formo de V (homo) kaj la malsupran branĉeton, kurbigitan al la maldekstra kun ĝia pinto iom supren direktita (tero). En la »natura« skolo oni aranĝas florojn tiel ke ili harmoniiĝu al la formo de vazo kaj al la alkovo. Laŭ floroj oni elektas diversajn vazojn kaj konsideras lokon por montri. Ĉefe virinoj sin okupas en tiu ĉi arto. Ili komencas la lernadon dum ili estas junaj. La arto estas do unu doto de la edziniĝo.

Principe oni konsideras valoron en simpla formo, kiu estas akompanata de eleganta nuanco. Tie ĉi mi povas kompreni ankaŭ unu specon de la esenco de la japana arto. Utiligante naturan belecon de floroj, ne aldonante artefaritan ornamon, oni ĝuas la naturan belecon en sia propra figuro.

Nuntempe la floraranĝo fariĝas monde fama, eĉ internacia kaj en Okcidentaj landoj multe da virinoj sin okupas je tiu ĉi japana arto.

### Nô-ludo

Inter diversaj teatraĵoj japanaj, mi volas citi la »nô-ludon« kiel tipe japanan. Oni ofte havas maskojn ĉe la vizaĝo, la moviĝo de la korpo estas ĝenerale tre malrapida, eĉ unu moviĝo de mano, piedo k. a. estas formulita precize aŭ rigore. La ludo sur la scenejo estas entute malrapida; muziko de orkestro kaj kanto helpas la ludon .



Por montri ploradon, k. e. ludanto nur tenas sian manon platan ĉe la frunto kaj silente staras kun vizaĝo iom suben rigardanta. Neniu vorto, nek sono. Silento regas---kaj la aŭskultantaro povas bone kompreni kiel malĝoje ploradas la aktoro. La aŭskultantaro komprenas en perfekta simpatio kortuŝan sintenadon de la ludanto. En maksimuma simpleco oni sentas malsimplan, profundan senton.

Nô-ludo estis fondita en la 14a jarcento de aktoro Kan-ami kaj lia filo Ze-ami. Estis 242 ludtekstoj kaj interalie ĉirkaŭ 100 estas plej ofte ludataj nuntempe. Nô traktas ĉefe historiajn rakontojn. Budaismo influis la enhavon, ĉar bonzoj skribis multe da tekstoj. Malmulta korpa movo, ludo en malrapida rapideco, kun monotona muziko karakterizas tiun ĉi ludon. Estas rimarkinde, ke »nô« estas ludata de ne nur profesiaj aktoroj, sed plejparte de ordinara popolo aŭ amatoroj kaj la ludo disvastiĝas tre vaste, kiel popola ludo.

### Muziko kaj Pentraĵoj

Principo japana, »trovi senliman belecon en ekstrema simpleco«, estas aplikata ankaŭ al pentraĵo kaj muziko. **»Ŝamisen«,** trikorda portebla muzikilo estas la plej populara instrumento, ludata de amatoroj, majstroj kaj ankaŭ de »geiŝoj«. »Koto« estas pli granda instrumento kun 13 kordoj. Ambaŭ povas simfonii samtempe. Al ili aldoniĝs bambua fluto nimata »Ŝakuhaĉi« kun kvin truetoj. La trio estas plej vulgara kaj banala en Japanujo.

Rilate al pentraĵo, ni havas unu skolon nomatan »nanga« aŭ sudstila arto, importita el Ĉinujo, en kiu oni pentras personon, pejzaĝon k. a. nur per nigra inko je diversa denseco. Simpla aspekto, sed la arto estas treege delikata. En kelkaj porcelanoj, vazoj, tasoj, oni havas nigre kolorajn simplajn ujojn, kiuj estas tamen tre delikataj kaj multekostaj. La vorto »ŝibui« esprimas tian sencon. Mi ne povas trovi tradukeblan vorton en aliaj lingvoj, nek en Esperanto. **Ŝibui** signifas originle guston adstringan de unu nematura frukto. Sed, ĝi transformiĝas al vorto montri ideon »neluksan, nepompan, elegantan, rafinitan, poluritan, sindeteneman, sed multekostan«. La ideo estas tiel komplikita. Mi vidas ĝuste en tiu ĉi vorto »ŝibui« sa esencon de la japana arto.

### Poezio

Ekzistas diversaj specoj de versoj kaj poemoj en Japanujo. Sed el ili estas la plej popularaj, du specoj, »tanka« kaj »haiku«. Tanka estas 31-silaba poemo (5—7—5—7—7) kaj haiku estas pli mallonga (17-silaba: 5—7—5). Haiku estas, mi pensas, la plej vaste farata de la popolo. En nur 17 silaboj oni volas esprimi ĉiujn ideojn kaj tiu arto

estas tre ŝatata de la japano. Oni kredas ke la fondinto de Haiku estas **Baŝo Macuo** (1644—1694). Mi citos unu ekzemplon, kiun tradukis Esperanten Sro Ossaka, Tokio.

Laget' malnova—
neni' en aŭd'...
jen rano- plaŭd'!
Silent' denova...

Tiu ĉi kvazaŭ fragmenta formo de poezio plaĉas al sento de la japano. La versfarado disvastiĝas kaj centoj da miloj el popolo faras ĝin mem. Mi pensas ke la simpleco akiris simpation de la popolo. Fine mi devas iom tuŝi la spiritan aŭ religian flankojn, de la »Zen« — sekto de Budaismo. Zen influis treege al kelkaj japanaj artoj, kiujn mi citis hodiaŭ. Zen estis fondita de »Eisai« (1141—1215) kaj »Dôgen« (1200—1253), unu sekto de Budaismo, kiu predikas savon per severa disciplino al korpo kaj animo, postulanta sinregadon per asketismo.

»Rigardu atente internen kaj vi trovos tie Budaon« estas la moto de la Zen doktrino. Zen havis multajn adeptojn inter samurajoj aŭ feŭdaj soldatoj kaj mi vidas ke la Buŝidô (japana kavalireco) estis ege influita de Zen.

**Konkuldo**

Mia prelego pri la esenco de la japana arto estas pure mia privata opinio, sed mi kredas ke en la literaturo multaj aŭtoroj malkaŝis siajn opiniojn ankaŭ en la sama maniero kiel la mia. Japanoj preferis sin meti en la naturon, eĉ volis artefaritan belaĵon meti en la naturon kaj evitis tendencon de la elstaro aŭ eminentiĝo. Kvazaŭ en la naturo, kvazaŭ nature, — ili volas vidi ĉion silente, trankvile. »Io en bona harmonio kun la naturo« estas esenco de la japana arto.

En la lastaj jaroj tamen ni havas en Japanujo grandan influon de la Okcidenta arto en ĉiu flanko de artoj. Sed mi nur eltiris propran japanan karakteron por rakonti al vi tradicie nutritan esencon de diversaj artoj japanaj. Se vi bonvolis kompreni mian paroladon, mi estas tre kontenta, kaj mi diras al vi, ke vi havu estonte okazon studi plu japanajn aferojn per multaj libroj aŭ artikoloj.



SCIENCA REVUO, eldono de Internacia Scienca Asocio Esperantista, Vol. 15, n-ro 1/2 (1965)

530.11 : 167.7

## ĈU LA RELATIVECTEORIO ESTAS REVIZIENDA? (2-a parto)

**(D-ro Wolfgang Ehrenberg — Germanujo)**

En la 1-a parto de ĉi tiu artikolo ni konstatis, ke la fenomeno de la aberacio ne plu estas obstaklo interpreti la negativan rezulton de la Michelson-Morley-eksperimento kiel kunmovadon de la lumo-medio, ĉar perpendikla impulskomponanto de la fotono devas konduki en ĉiu kazo al la aberacio-nomata direktaĵdeviaĵo de la lumo. Do ekestas la demando, ĉu eble la koncepto de 4-a dimensio, derivata de Einstein el la Michelson-Morley-rezulto, povas esti tute forlasita. Tio ne pravus. Ni ne nur vidis, ke ankaŭ la energivektormodelo kiel alternativo al la relativecteorio bezonas 4-an dimension, sed ekzistas ankaŭ alia mistera rilatumo, kiu fariĝas komprenebla sur bazo de 4-a dimensio: la jam menciita rilatumo $uv=c^2$.

Imagu senmovan grupon de materiondoj en 4-dimensia spaco, transkurata kun lumrapideco c de nia 3-dimensia spaco kiel nuntempeca fronto. La centro de tia ondgrupo, karakterizata per linio perpendikla al la ondkrestoj, sekcas nian spacon en certa punkto, ĉirkaŭigata de la 3-dimensiaj spuroj de la 4-dimensiaj ondkrestoj. En tia modelo la progresvojo ct de nia 3-dimensia spaco en la direkto de la 4-a dimensio estas ligata al la migrovojo vt de la ondgrupocentro, tio estas